



# THE ESPERANTO MONTHLY

A  
MAGAZINE  
FOR  
TEACHERS  
AND  
STUDENTS  
OF THE  
INTERNATIONAL  
LANGUAGE



*All the world  
at your elbow*

## ZAMENHOF-DAY NUMBER

### BIALYSTOK

THE BIRTHPLACE OF  
THE INVENTOR OF ESPERANTO

Published by  
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC)  
17, HART STREET, LONDON, W.C.1.

# ESPERANTO AT A GLANCE

ESPERANTO IS PHONETIC.

All letters sounded :  
one letter  
one sound.

ACCENT or STRESS falls on the second last syllable.

NO IRREGULARITIES.  
NO EXCEPTIONS.

## THE ALPHABET OF ESPERANTO

A a B b C c Ĉ ĉ D d E e F f G g  
ah bo tso cho do ek fo go  
Ĝ ĝ H h Ĥ ĥ I i J j Ĵ ĵ  
Jee ho hho ee yo zho  
K k L l M m N n O o P p R r S s  
ko lo mo no ok po ro so  
Ŝ ŝ T t U u Ŭ ŭ V v Z z  
ŝo toe oo uoe vo zo  
No Q, W, X, or Y.

A, E, I, O, U have approximately the sounds as in bar, bear, bier, bore, boor.

C is not sounded like S or K, but like ts in Tsar.

J has the sound of y in yes.

The sounds of ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, and ŭ are heard in leech, liege, loch, leisure, leash, and leeway.

THE GRAMMAR is based upon SIXTEEN FUNDAMENTAL RULES.  
THE PARTS OF SPEECH are formed from Root-Words by the addition of appropriate Letters.

**O** is the ending of the NOUN:  
fakto gluo  
telefono fajro  
piano tasko

ADJECTIVES end in **A**  
evidenta freŝa  
longa furioza  
granda simpla

NOUNS and ADJECTIVES form the PLURAL by adding **J**  
evidentaj faktoj longaj telefonoj grandaj pianoj  
aj, oj sound as in my boy

THE SIMPLE VERB HAS ONLY SIX INFLECTIONS.

INFINITIVE.	PRESENT.	PAST.	FUTURE.	CONDITIONAL.	IMPERATIVE.
<b>I</b>	<b>AS</b>	<b>IS</b>	<b>OS</b>	<b>US</b>	<b>U</b>
ESTI	estas	estis	estos	estus	estu
LERNI	lernas	lernis	lernos	lernus	lernu
INSTRUI	instruas	instruis	instruos	instruus	instruu
<b>N</b> marks the ACCUSATIVE (direct object)				ADVERBS end in <b>E</b>	
Mi (I) instruas lin (him)				rapide	
Li (he) instruas min (me)				entuziasme	
Ŝi lernas Esperanton				diligente	

## ESTU PRETA: LERNU ESPERANTON

PARTICIPLES used as ADJECTIVES, NOUNS, and ADVERBS:

ACTIVE—Present -ANT'	Past -INT'	Future -ONT'
PASSIVE—Present -AT'	Past -IT'	Future -OT'
Mi estas instruanta.	Mi estas la instruanto.	Instruante, mi lernas.
Vi estas instruata.	Vi estas la instruato.	Instruate, vi lernas.

<b>ĈU</b> pr. <i>chew</i> . ASKS QUESTIONS.	piano	} estas	rozo	} estas	banano	} estas	elefanto	} estas
	harpo		tulipo		tomato		gorilo	
	fluto	} INSTRUMENTO	lilio	} FLORO	melono	} FRUKTO	ĝirafo	} BESTO
	violono		geranio		olivo		kato	
	orgeno		violo	oranĝo	hundo			
	trumpeto		narciso	figo	kamelo			

Let your YES be **JES** and your NO be **NE**

LA	THE PREFIX	MAL	DENOTES OPPOSITES.	KOLOROJ.
tasko } estas simpla		malsimpla		blanka papero
piano } (is) granda		malgranda		ruĝa inko
(The) fiŝo } estas freŝa		malfreŝa		blua krajono
anekdoto } (was) longa		mallonga		bruna ĉokolado
progreso } estas rapida		malrapida		rozaj lipoj
raporto } (will be) favora		malfavora		

NUMERALS—UNU, 1; du, 2; tri, 3; kvar, 4; kvin, 5; ses, sep, ok, naŭ, dek; cent, 100; mil, 1000; miliono. ORDINALS: unua klaso, dua klaso, tria klaso.

PROFESSIONS shown by suffix	IST	FEMININES shown by suffix	IN
dentisto	ĵurnalisto	patro	patrino
farmaciisto	botisto	reĝo	reĝino
		leono	leonino

An ESPERANTO KEY, containing Grammar, Vocabulary, and Exercises, will be sent on receipt of a penny stamp by THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorp.), 17 Hart Street, London, W.C.1

## Bialystok, la Naskiĝurbo de D-ro Zamenhof.

Bialystok estas konata al ĉiu Esperantisto kiel la naskiĝurbo de la Majstro. La Majstro mem tre ofte en siaj paroladoj kaj leteroj rememoras pri sia "kara urbo de naskiĝo" kaj pri sia patrujo, la "malfeliĉa Litovujo." Laŭ la propono de la redakcio de *The Esperanto Monthly* mi prezentas tial al la legantoj la priskribon de Bialystok.

Bialystok kuŝas je 53.08° de norda latitudo kaj 23.09° de okcidenta longitudo laŭ Grinviĉ, 134 metrojn alte super la maro. Ĝi estas grava fervoja punkto, ĉar ĝin trairas diversaj fervojaj linioj: al Varsovio, Grodno, Brest-Litovsk, Vilno. Ĝia nomo signifas "la defluo de la Blanka (*Biala*)." Tiu "Biala" aŭ "Bielaja" estas malgranda rivereto, trafluanta la mezon de la urbo. La vizitantojn de Bialystok ĉiam mirigas, ke la "Blanka" en efektiveco estas tre "malblanka," malpura rivereto. Malnova legendo rakontas tamen, ke iam "Biala" estis ankaŭ blanka kaj larĝa rivero, sed ĉar en ĝi dronis la tiama bialystoka princo, tial la princedzino malbenis la Biala'n, ekkriinte: "Ho, rivero Blanka, vi nigriĝu, via elfluo mallarĝiĝu, kiel fingro!" De tiu tempo, laŭ la diroj de la legendo, la rivero nigriĝis kaj mallarĝiĝis, kaj tiel ĝi aspektas ankaŭ nun.

Bialystok estis fondita kiel vilaĝo en la jaro 1320 de la fama fondinto de Vilno, la litova princo Gedimin (regis 1316-1341). En Februaro de la jaro 1386 la litova princo Jagello edziĝis kun la heredantino de la pola trono, Jadviga, kaj akceptinte tial ankaŭ la titolon de "pola reĝo," kunigis Litovujon kun Polujo. Sed la vilaĝon Bialystok kaj aliajn lokojn li ankoraŭ en la jaro 1384 donacis al sia ribelanta kuzo Vitold (alie nomata Vitovt), kiun li poste en la jaro 1392 nomis "grandprinco de Litovujo."

En la jaro 1401 okazis la kuniĝo de Litovujo kun Polujo, kaj en la jaro 1569 la kuniĝo de tuta Litovujo, Prusujo kaj Latvujo kun Polujo, sekve de kio ankaŭ Bialystok ekapartenis al Polujo. La lasta reĝo el la idoj de Jagello, Jan Kazimir (1648-1669) donacis en la jaro 1661 la vilaĝon Bialystok kune kun la aliaj ĉirkaŭaj vilaĝoj al la pola duko Stefano Czarnecki (Ĉarnecki) (naskiĝis 1599, mortis 1665), post kies morto ĝin ricevis lia nepo Klemens Branicki. Branicki enloĝiĝis en Bialystok, konstruigis en la jaro 1703 belegan palacon, ekzistantan ĝis nun kaj faris el Bialystok urbon. En 1749, dum la regado de la reĝo Aŭgusto III., ĝi estis oficiale nomita urbo. En la jaro 1771 Branicki mortis kaj la urbon laŭ lia testamento ricevis duko Joaĥimo Potocki, kaj post ties morto la dukoj Felikso kaj Johano Potocki. Dum la tria divido de Polujo en 1795 Bialystok estis enkorpigita en Prusujon, kies reĝo Frideriko Vilhelmo aĉetis ĝin ĉe la dukoj Potocki por 207,970 "taleroj." De 1795 ĝis 1807 Bialystok restadis sub prusa administrado kaj formis provincon "Nova-Orientprusujo" ("Neu-Ostpreussen"). En la jaro 1807 laŭ la "Tilzita paco," okazinta en Tilzito (Tilsit) inter Napoleono, Frideriko Vilhelmo kaj la rusa imperiestro Aleksandro I-a la bialystoka regiono estis aligita al Rusujo. En 1812 Bialystok estis nelongtempe okupata de la franca armeo de Napoleono la Granda. La Viena Kongreso de 1815 konfirmis la aligon de Bialystok al Rusujo. De tiu tempo Bialystok formis parton de la "Nord-Okcidenta Regiono," t.e. Litovujo en la limoj de la Rusa Imperio. Post la komenco de la eŭropa milito ĝin la 26-an de aŭgusto 1915-a okupis la germanoj, adminis-

tris ĝin kiel parton de Litovujo, faris el ĝi en la jaro 1917-a administran centron de la milita administrado de Suda Litovujo ("Militaerverwaltung Litauen-Sued") kaj restis en ĝi ĝis la 19-a de februaro 1919-a. La 19-an de februaro de la jaro 1919 laŭ interkonsento inter la germana okupacia armeo kaj la pola generala ŝtabo la urbon okupis la pola armeo.

Kiel do oni vidas Bialystok dum sia preskaŭ 600 jara ekzistado jam

aro teritoriojn). Grandrusujo, konfirmanta nur la sendependecon de Polujo en ĝiaj antaŭmilitaj limoj, sed ne tiun de aliaj formiĝintaj sur la teritorio de antaŭa rusa imperio regnoj, volus ankaŭ ricevi Bialystok.

La urbo mem havas relative malmulte da eksteraj rememoraĵoj pri la historia kresko de la urbo. Al tiuj malmultaj historiaĵoj apartenas antaŭ ĉio la supre jam menciita "palaco de Branicki," kiu kon-



GRANDA BAZARA STRATO, BIALYSTOK.

La sago meze de la strato montras la finon de Zamenhof-Strato.

multfoje ŝanĝis sian politikan apartenon. Eĉ nun, kiam estas skribataj ĉi tiuj linioj, la packonferenco ne diris ankoraŭ sian vorton pri Bialystok. Je la packonferenco pretendas je Bialystok Litovujo, Polujo, Blankrusujo kaj lastatempe eĉ la renaskiĝanta Rusujo. Polujo pretendas je Bialystok precipe laŭ historia vidpunkto, Blankrusujo precipe laŭ la etnografia, Litovujo laŭ histori-politika vidpunkto (Litovujo lastatempe konsentis kuniĝi kun Blankrusujo pro la nebleco dividi la loĝatajn de miksitaj loĝant-

sistas el 3 konstruaĵoj, ĉirkaŭitaj de grandega parko. Antaŭe la parko de la palaco estis kunigita ankaŭ kun la nuna "urba arbaro," kie tiam estis menaĝerio. Eĉ nun tiu urba arbaro estas nomata "zwierzyniec" ("Menaĝerio"). Depost 1841 ĉiuj artobjektoj el la palaco estis forveturigitaj Petersburgon kaj en la palaco mem estis aranĝita "Instituto de Nikolao I. por nobelaj fraŭlinoj," t.e. fermita edukejo-lernejo por filino de rusaj nobeloj. Dum la germana okupacio 1915-1919 la palacon okupis antaŭe

la germana stabo kaj poste la germana milita administrado de la okupita Suda Litovujo. Ankaŭ la nuna "urba ĝardeno" iam estis kunigita kun la palaco de Branicki.

El la aliaj historiaj konstruaĵoj estas notinda la domo je la strato Germana No. 6. Ĝi estas konstruita de itala arĥitekturo kaj estis dum la vivo de la lasta Branicki verŝajne teatro. En la supra etaĝo de tiu

la jaro 1833 estis virina monaĥejo, pri kio atestas la pendanta ĝis nun murtabelo kun latina surskribo.

Tre originala kaj interesa konstruaĵo estas la "urba turo," konstruita en la XVIII. jarcento kiel urbodomo kaj servanta delonge ĝis nun al la fajrobrigado. Ĉar en la tempo, kiam tiu turo estis konstruita ne ekzistis ankoraŭ la telefonoj kaj eĉ nun pro la milito la uzado de



STRATO DE ZAMENHOF, BIALYSTOK.

Antaŭe Verda Strato, en kiu troviĝas la domo en kiu D-ro Zamenhof naskiĝis.  
Speciale fotografita por "The Esperanto Monthly" de W. Szapiro, Bialystok.

domo estas ankoraŭ nun granda salono kun restoj de galerio. Aliaj famoj diras, ke tie iam estis masona loĝio. Krom tio, tiu domo estas interesa ankaŭ pro tio, ke Napoleono dum sia remarŝo el Moskvo estinte en Bialystok tranoktis en ĝi. Interesa estas ankaŭ la malgranda katolika preĝejo je la sama strato, lignkonstruita jam en 1576 kaj rekonstruita en 1746 de Branicki. Kontraŭ ĉi tiu preĝejo staras la t.n. "germana hotelo," kiu antaŭe ĝis

telefonoj estas preskaŭ nebla, tial la deĵoranta sur la balkono de la turo fajrobrigadisto atente observas la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn kaj rimarkinte fumon tuj signalas al la fajrobrigado.


El aliaj konstruaĵoj ni notu ankoraŭ la "realan lernejon," kiu estas konstruita en 1804 dum la prusa administrado en Bialystok laŭ la ordono de la reĝo Frideriko Vilhelmo III. kaj kiu interesas nin Esperantistojn, pro tio, ke ĝi estas

la "alma mater" de nia neforgesebla Majstro.

La Esperantistojn interesas kompreneble ankaŭ la strato kaj la domo, en kiu naskiĝis D-ro Zamenhof. Ni sukcesis konstati, ke li naskiĝis je la "verda strato." Laŭ la peto de grupo de ĉi tieaj samideanoj, kiu estis subtenita de kelkaj kultur-societoj, la Urba Komitato de Bialystok en sia kunsido de 11-a de junio 1919 decidis por honorigi sian eminentan samurbanon alinomigi ĉi tiun straton "Strato de Zamenhof." Tiu ĉi strato kuŝas en la centro de la urbo kaj deiras de la ĉefa strato. Ni ĝojas prezenti al la legantoj fotograf-aĵojn de tiu ĉi strato.

La domo en kiu nia Majstro naskiĝis troviĝas je angulo de la Zamenhof kaj Brudna (Sofijska) str. Tio ĉi estas malnova ligna domo kun tre interesa arĥitekturo. Ligna kovrita ŝtuparo kondukas al la supra etaĝo en la loĝejon, kie naskiĝis la Majstro. La loĝejo mem estas tre mizera kaj malgranda; ĝi konsistas el tri etaj ĉambroj. La domo mem restis ĝis nun en la sama stato, kiel ĝi estis, kiam naskiĝis la Majstro.

Antaŭ la milito Bialystok havis ĉirkaŭ 100,000 loĝantojn, nun nur 60-70,000. Ĝia loĝantaro konsistas, kiel oni jam scias el la "Letero pri



DOMO EN BIALYSTOK EN KIU NASKIĜIS D-RO ZAMENHOF.

La lasta fenestro maldekstre signita xx apartenas al la ĉambro en kiu D-ro Zamenhof naskiĝis.

*Speciale fotografita por "The Esperanto Monthly" de S-ro Loznicki, Bialystok.*

la deveno de Esperanto" el diversaj nacioj: blankrusoj, poloj, rusoj, hebreoj, germanoj. El ili estas 70% da hebreoj, 20% da poloj, la reston faras la dicitaj aliaj nacioj.

Bialystok estis antaŭ la milito grava industria centro, liveranta siajn ellaboraĵojn precipe en Rusujon kaj konkurante eĉ kun la germanaj, francaj kaj anglaj ellaboraĵoj. La ĉefaj objektoj de la bialystoka industrio estis: diversaj drapoj, litkovriloj, ledoj. Krom tio estis fabrikataj maŝinoj, cigaredoj, ĉapeloj, sapoj, butonoj, k.t.p. Laŭ la oficiala rusa statistiko de la jaro 1895 en Bialystok estis 230 drapfabrikoj kun

**THE**  
**Esperanto Monthly**

*A Magazine for Teachers and Students of the  
International Help-Language*

**Edited by W. M. PAGE**



**Volume VII**

**JANUARY TO DECEMBER**

**1919**



**London**

**THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INCORPORATED)**

**17 HART STREET, W.C.1**

# THE ESPERANTO MONTHLY

## INDEX, 1919

	PAGE
Bialystok ... ..	129
Bretonland. E. F. CENSE ... ..	98
Buxton, Charles Roden, on Esperanto ... ..	55
Chambers of Commerce. BATH ... ..	8
Commercial Esperanto ... ..	I, 9, 21
Commercial Letters ... ..	40, 52, 65, 79, 114, 126
Competitions—	
For Boys and Girls ... ..	8, 20, 32, 44, 56, 68, 80, 92, 104, 128
Congress—Why go to the? ... ..	45
Correlatives, Apparatus for Learning ... ..	119
Don'ts. W. HARVEY ... ..	59, 78
Druidoj, Notoj pri. GRIFFITHS ... ..	66
Ekzercoj de Aplikado. H. M. SCOTT ... ..	16, 42, 54, 124
English as the International Language ... ..	26
Esperanto—	
The Structure of. H. M. SCOTT ... ..	73, 87, 111
Defence of. Dr D. O. S. LOWELL ... ..	81
Friendship—	
President Wilson on ... ..	15
International, The Machinery of ... ..	14
George, Lloyd. Eltiraĵoj de Paroladoj de. (Portreto) ... ..	37
Glasgow, Congress ... ..	67, 69, 71
Halcyon Days ... ..	69
International Experiment ... ..	1
“Iufoje,” Notoj pri. GEGO ... ..	18
Japan, Congress in ... ..	91
Japana—Progress de Industrio ... ..	50
Keltoj, La ... ..	93
Kiel regi sin kontraŭ Nervekscito ... ..	29



	PAGE
Klasigo de Lingvaj Respondoj. Ro Ŝo ... ..	61
Konsiloj al la Printempaj Poetoj. M. C. BUTLER ... ..	26
League of Nations ... ..	47
Esperanto and. Prof. SAROLEA .. ..	117
Lingvaj Respondoj, Klasigo de ... ..	61
Literaturaĵoj—	
Fantazioj de Dormanta Bardo. <i>Tr.</i> RHYS GRIFFITHS ... ..	96
La Ĉapelo de Joĉjo Jones. <i>Tr.</i> G. RHYS GRIFFITHS ... ..	35
La Parolado. J. MERCHANT ... ..	76
Mia Psikologia Problemo. M. C. BUTLER ... ..	89
Muraĥo kaj Minaĥo. ANGUS M'CALLUM ... ..	95
Vera Dankeco. J. MERCHANT ... ..	113
Vizio pri Milito kaj Vizio pri la Estonteco. INGERSOLL ... ..	58
Liverpool Congress ... ..	46, 69, 70
Opero en Esperanto ... ..	103
Oxenham, John, on Universal Language ... ..	15
Poezio—	
APPLEBAUM, J. D.—	
Lando de l' Patroj. ( <i>Tr.</i> ) ... ..	38
La Plendo de l' Vento. ( <i>Tr.</i> ) ... ..	39
Lulkanto ... ..	50
BICKNELL, CLARENCE—	
Adiaŭ ... ..	29
L'Anserino (Tennyson) ... ..	60
Al la Okcidenta Vento (Herrick) ... ..	78
La Lekanteto (E. Rambert) ... ..	86
BRIGGS, LOUISE—	
Episkopo Hatto kaj la Ratoj (Southey) ... ..	122
CARRIERA, SALDANHA—	
Kaptito ... ..	17
Sinjoro la Bufo ... ..	31
CAW, J. P.—	
La Terparcel' ... ..	20
DEANS, AGNES B.—	
La Skaja Boatkanto (Boulton) ... ..	97
Revenu vi (Wilson) ... ..	97
EDWARDS, JACK—	
Ĉiam restu, Ho! Somer'. ( <i>Tr.</i> ) ... ..	38
GRIFFITH, G. MEIRION—	
Tra l' Tuta Nokt. ( <i>Tr.</i> ) ... ..	38
Revenu vi Hejmen. ( <i>Tr.</i> ) ... ..	38
POTTS, BERTRAM—	
Mirinda Printempo ... ..	29
La Matena Roso ... ..	39
La Blankaj Diantoj ... ..	78
La Kanto kaj la Floro ... ..	101

	PAGE
POTTS, BERTRAM—	
La Murmurantaj Pinoj ... ..	110
La Horoj Senriprocaj ... ..	128
ZAMENHOF—	
Preĝo sub la Verda Standardo (Esperanto and English) ... ..	72
Play the Game ... ..	49
Possessive Pronouns ... ..	120
Ridetantoj, Ĉiuj ... ..	102
Rolland Romain, and Esperanto ... ..	101
Schools—	
Esperanto in the ... ..	85
Bishop Auckland ... ..	85
France. F. DURIEUX ... ..	30
Eccles ... ..	31
Scouts' Esperanto League. "AVOTO" ... ..	105
U.E.A. Oficiala Adresaro ... ..	109
Wales—	
Kimrujo kaj Esperanto ... ..	33
Wilson, President, on Friendship ... ..	15

**ABONU**

AL "THE BRITISH ESPERANTIST"

4s (2 sm.) jare

**KOTIZU**

AL "THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION"

5s (2 sm. 500) jare

**SUBSKRIBU**VIAN NOMON SUR GARANTILO POR HELPI AL  
NIA AFERO**MONOFERU**AL LA PROPAGANDA KASO DE LA B.E.A. LAŬ  
VIA POVO

5000 laboristoj, produktantaj drapojn je  $3\frac{1}{2}$  milionoj rublojn jare. Da ledaj fabrikoj estis en 1913 en Bialystok 50, kun 1000 laboristoj; krom tio funkciis 3 maŝinfabrikoj, 2 cigaredfabrikoj, 2 ĉapelfabrikoj, 3 vاتفabrikoj, k.t.p. La brikejoj en Bialystok produktis en 1912 ĉirkaŭ 25 milionojn da brikoj.

Nun pro la manko de krudaj materialoj, nenormalaj laborkondiĉoj, necerta politika situacio, kaj ĉefe pro la daŭranta ankoraŭ en la oriento de Eŭropo milito, la bialystoka industrio dume estas preskaŭ tute morta. Funkcias penpene nur kelkaj fabrikoj.

En Bialystok aperas nun unu ĉiusemajna kaj kvar ĉiutagaj gazetoj; nome: "Chata Polska" ("Pola Kampodomo"), ĉiusemajna popola ĵurnalo en pola lingvo, 12-16 paĝa en formato de "La Revuo"; ĉiutaga pola "Dziennik Bialostocki" ("Bialystoka ĵurnalo") duonoficiala organo, 4 paĝa en formato de "Esperanto," aperanta de la 1-a de Aprilo 1919; ĉiutaga rusa "Golos Belostoka" ("La Voĉo de Bialystok"), la plej malnova gazeto en Bialystok, aperanta de la jaro 1910, liberala organo, 4 paĝa en granda formato (dum la jaroj 1916-1918 pro la okupo de la urbo ĝi entute ne aperadis); ĉiutaga hebrea "Dos naje leb'n" ("La nova vivo"), aperanta de februaro 1919, popola organo, 4-6 paĝa en formato iom pli granda ol "Dziennik Bialostocki" kaj ĉiutaga hebrea "Bialystoker Folksblat" ("Bialystoka Popola Gazeto"), aperanta de junio 1919, cionista organo, 4-6 paĝa en formato de "Esperanto." La rusa "Golos Belostoka" kaj la hebrea "Dos naje leb'n" favore rilatas al Esperanto kaj tre ofte presigas priesperantajn notojn kaj artikolojn. Precipe la unua subtenas nian aferon kaj ankoraŭ antaŭ la milito en la jaroj 1912-1914 presigis serion da diversaj artikoloj kaj notoj pri nia movado, k.t.p.

Dum la germana okupacio en

Bialystok aperadis nur unu oficiala "Bialystoka gazeto" en 3 lingvoj (germana, pola, hebrea). La aperado de privataj gazetoj estis tiam malpermesita.

La legantoj verŝajne supozas, ke en la multlingva Bialystok ekzistas almenaŭ kelkdek esperantaj societoj. Ili do senfine miros, eksciante, ke en la naskiĝurbo de la Majstro ekzistas . . . nek unu esperanta societo! Malgranda areto da samideanoj klopodas disvastigi nian belan lingvon kaj ideon. Malfacila estas ilia vojo, sed la unuaj fruktoj de ilia laboro en Bialystok jam videbliĝas. Multaj penoj estas tamen ankoraŭ necesaj por atingi la deziratan celon. Ĉar dume konfirmiĝas nur la vereco de la proverbo: "Ne estas profeto en sia patrolando."

J. ŠAPIRO, E.L.A.

\* \* \*

Vizitanto al malliberejo multe interesiĝis pri maljuna malliberigito, kiu plendis pri la maljusteco de sia kulpigo.

— Pri kio, oni kulpigis vin? la vizitanto demandis al li.

— Pri la ŝtelo de poŝhorloĝo, li respondis. — Kaj mi dungis eminentan advokaton, kiu pruvis alibion per dek atestantoj, kaj poste faris longan defendparolon al la ĵurintaro. Sed ne utilas al mi. Oni dekjaris min.

— Sed kial oni ne senkulpigis vin?

— Nu, li klarigis, oni trovis la poŝhorloĝon en mia poŝo.

\* \* \*

La instruistino en la dimanĉa lernejo, klarigis al la knaboj, ke en ĉielo tiuj, kiuj estas virtaj sur la tero ricevos glorajn kronojn.

— Nu, ŝi diris, ĉu iu povas diri al mi, kiu ricevos la plej grandan kronon.

Silento regis, dum momento, kaj jen voĉo aŭdiĝis:

— Tiu, kiu havas la plej grandan kapon.

\* \* \*

— Oni diras, ke ŝi dormomarŝas,

— Ĉu? malgraŭ la fakto, ke ŝi posedas du aŭtomobilojn!

## Neatendita Sukceso.

JOHN MERCHANT.

*Mi renkontis ŝin je lundo  
En la urbo, kun patrin' ;  
Mi rigardis ŝin senĉese,  
Sed—ŝi ne ekvidis min !*

*Mi retrovis ŝin je mardo  
En la parko, kun kuzin' ;  
Ŝi salutis preskaŭ ĉiun,  
Sed—ŝi ne rekonis min !*

*Je merkredo, al koncerto  
Kun la patro iris ŝi ;  
Kaj aplaŭdis la kantintojn,  
Sed—sin turnis for de mi !*

*Je la ŝaŭdo, en kafejo,  
Ŝi sidiĝis apud mi ;  
Pro la amo, mi ne manĝis,  
Sed—senĉese manĝis ŝi !*

*Je vendredo kaj sabato,  
Laŭtenison ludis ŝi ;  
Kun junuloj ŝi konkursis,  
Sed—ne ludis ĝin kun mi !*

*Sed dimanĉon, en preĝejo,  
Ŝi, dum dormis la patrin',  
Al mi ŝetis belan rozon,  
Kaj murmuris : " Amu min " !*

*Ŝajne, min ŝi ne ekvidis  
Ĝis la rozon ŝetis ŝi ;—  
Vere, la fraŭlinoj vidas  
Multe pli ol pensas ni !*

*Jen instruo por legantoj :  
Ĵetu semojn antaŭ vi,  
Kaj vi helpos Esperanton  
Ĝis triumfon gajnos ĝi.*

\* \* \*

La farmaciisto diris pri maljunulo kun kalva kapo, kiu ĵus eliris el la farmaciejo.

— Tiu estas la plej granda optimisto, kiun mi iam vidis.

— Kiel ?

— Ĉar, kiam mi garantiis, ke mia patenta harkreskigilo efikos en tri tagoj, li tuj aĉetis brosilon kaj kombon.

## La Revo.

Estis serena somera tago. Menso kaj korpo en la tremeta aero sen-energie dormetis.

Kontente inter molaj kusenoj mi kuŝis, rigardadante serene la familiarajn objektojn en la ĉambro. Miaj okuloj ameme observis salikan trunketon, emblemon de la fiŝkaptarta. Jes, antaŭe mi estis membro el la fratularo de *Isaac Walton*.

Revo venis al mi, fantoma rememoro pri pasinta aŭgusta tago. . . .

La rivero fluis trankvile inter verdaj bordaj. Insektoj tuŝflugis la supraĵon. La salikoj ŝetis nigrajn ombrojn, kie la rivero ŝajnis restadi, kvazaŭ serĉante ŝirmon kontraŭ la brilega suno.

Mi sidis sur la bordo, fiŝkaptilon tenante malfirme per la manoj.

La bordo kaj la rivero ŝajnis preterpasi rapide. Subite estis krio—plaŭdo. Mi subakviĝis.

Lumaj radioj tremetis tra la malumo. Mi aŭdis konfuzan gargaronan murmuron.

Trutego, nigra kaj oliva, min observis kun moka triumfo; perketo min flankrigardis ĝoje; angilo en la ŝlimo ŝajnis voli mian detruon. Mi tremis.

Subite voĉo ektimigis la sovaĝan bandaĉon.

Mi kredis, ke la Rivera Spirito venas por min liberigi. Sed ne; familiara voĉo trarompis tra la romaneca nebuleto, kaj diris :

" Rapidu, la temanĝo estas preta."

Volonte mi eniris denove en la materian rondon.

H. C. DAVIS.

\* \* \*

Estas dirite pri filo de ĉevalvendisto, sprita knabo, ke foje neatendite alvokite de sia patro por suriri ĉevalon por montri ĝiajn paŝojn, la uleto flustris al la patro tiun demandon, por kontroli kiel li devus rajdi :

— Ĉu vi estas aĉetonta aŭ vendonta ?



## Competition for Boys and Girls.

### Result of Tenth Competition.

The highest number of marks in this Competition has been gained by:

RICHARD WIMBERLEY,  
Donaldson's Hospital,  
Edinburgh.

*Honours List* (20 marks).—Jas. Finlay, Meg Fleming, Robt. Jamieson, W. S. Kinghorn, Bella Leiper, Robt. Stewart, Alex. Watson, *Donaldson's Hospital, Edinburgh*; Katharine Osmond, *N. London Collegiate School*; Florence Barratt, Samuel Beardmore, Mona Beecroft, John Bennett, Cyril Brown, Sidney Brown, Harold Burns, Cyril Carter, Alfred Chappell, Geo. H. Crawshaw, Harry Crompton, Eric Daniels, Arthur Dean, John Drinkle, Sydney Duncan, Marjorie Dyson, Fred. Evans, Norman Finlow, John Fletcher, James Floyd, Frank Harley, Arthur Harris, Fred. Hesketh, Harry Higginbotham, Ella Holden, James Holland, John Holland, Ernest Holt, Ernest Humphries, Frank Jackson, Eliz. Jones, John Jones, Clara Kelly, Horace Kenyon, Wm. Kershaw, Dennis Kirwin, Edith Lea, Thomas Lea, Ernest Lees, Doris McClelland, H. Millward, Fred Monks, Eveline Morris, Lilian Moss, J. Niven, George Peters, Barry Savigny, Arthur Senior, Charles Shadbolt, Elsie Sheriff, Edward Sillence, Wm. Smith, Geo. Smith, Harold Smith, Walter Smith, John Stanbrook, Joseph Stark, John Thomason, Winifred Thomson, Charles Trott, Frank Ward, C. Watkins, Mark Weston, Samuel Wilkins, Kenneth Wilson, *Green Lane C.C. School, Patricroft*; Muriel Severn, *St John's College, Worcester*.

*Hon. Mention* (19 marks).—Eric Bamford, Edith Barnes, Ernest Beardshaw, F. Duesbury, John Emery, John Fleming, Hilda Hesketh, Thos. Hunter, Clifford Johnson, Godfrey Nelson, Cyril Johnson, Frank Pearson, Alex. Smith, L. Walker, *Patricroft*.

*Commended* (18 marks and under).—Kath. Langley, *Lady Manners School, Bakewell*; Constance Darbon, Dorothea Darbon, *Highbury Hill High School, London*; J. Craythorne, Harold Burrows, Smith Dugmore, Joseph Higham, Charles Roberts, Arthur Smith, John Stone, *Green Lane C.C. School, Patricroft*.

### SOLUTIONS.

(Tenth Competition, p. 116.)

Kunigoj:—(1) putor, (2) pupil, (3) koturn, (4) ferdek, (5) favor, (6) salvi, (7) orel, (8) paragraf, (9) kandel, (10) tricikl.

### Final Results.

This year's Competition has been the most successful of any which we have yet conducted.

219 boys and girls have competed, and 986 cards have been received as compared with 671 last year.

The prize-winners are as follows:—

1. MURIEL SEVERN (10), St John's College, Worcester. 164 out of 168 possible marks.
2. KATHARINE OSMOND (12), 36 Hanley Road, London, N.4. 158 marks.
3. JAMES FINLAY (13), Donaldson's Hospital, Edinburgh. 151 marks.
- 4 and 5. JOHN STANBROOK (12), KENNETH WILSON (12), Green Lane C.C. School, Patricroft. 137 marks each.

*Hon. Mention*.—Doris McClelland, Godfrey Nelson, John Holland, and John Fletcher, *Patricroft*; and Richard Wimberley, Bella Leiper, and W. S. Kinghorn, *Edinburgh*.

\* \* \*

Look out for the next Competition in the January "British Esperantist."

\* \* \*

— Kie estas Henriko? demandis la najbaro al la sinjorino, kies edzon li deziris vidi.

— Mi ne ĝuste scias, ŝi respondis. Se la glacio estas tiel dika, kiel li kredas, li glitkuras; se ĝi estas tiel maldika, kiel mi kredas, li naĝas.

\* \* \*

*Vizitantino* (ĉe la dompordo): Anjo, ĉu via patrino enestas?

*Anjo*: Ne, mi bedaŭras, ŝi ĵus eliris por butikoj.

*Vizitantino*: Kiam ŝi revenos?

*Anjo* (*laŭtvoĉe*): Panjo, kion mi diru?

\* \* \*

Ŝi: Ĉu vi scias, ke Zamenhof, la elpensinto de Esperanto, estis Hebreo?

Li: Ĉu vere! Oni ŝuldas multon al la Hebreoj?

Ŝi: Ĉu?

## Morituri te Salutamas.

Antaŭ sep jaroj *The Esperanto Monthly* naskiĝis; hodiaŭ ĝi ne plu aperas kiel aparta gazeto.

Ĝia celo de la komenco estis prezenti al la lernantoj kaj instruistoj de la internacia lingvo pli simplan materion ol tiu en la naciaj kaj internaciaj gazetoj; liveri helpon en la lernado de la lingvo; kaj inspiri la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

La redaktoroj ĉirkaŭis sin per kapablaj kaj sindonemaj kunlaborantoj, kiuj afable donis el la riĉaĵoj de sia sperto multajn utilajn artikolojn, kaj faciligis ilian taskon.

De la komenco la gazeto celis interesigi infanojn; ni kredas, ke ĝi estas la unua Esperantista gazeto, kiu serioze faris tion. Ni havas la ĝojon scii, ke ĝi kreis entuziasmon por Esperanto inter la infanoj, kion kelkaj portis en maturiĝon, kun multe da promeso por la estonteco.

Sed nia ĉefa ĝojo estas la scio, ke ĝi faris valoran helpon pri tiu enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kiu estas unu el la plej esperplenaj signoj de nia lingvo en la nuntempo, kaj en tiu rilato ĝia influo ne estis limigata al angleparolantaj landoj.

Dum la teruraj tagoj de milito, kiam la lampo de Esperanto lumis penege, *The Esperanto Monthly* sukcesis mirinde kuraĝigi la laborantojn por nia afero. Ofte el diversaj partoj de la mondo ni ricevis dankesprimojn pro niaj vortoj; kaj ofte aliaj gazetoj flatis nin per la represigo de niaj artikoloj.

Estas strange do, ke nia utila aparta kariero devas finiĝi. Sed tio estas unu el la rezultoj de la nuna stato de la mondo. En 1913, estis facile eldoni gazeton, kiun oni povas vendi por unu penco. Tiam presaĵoj ne estis tiel multekostaj kiel hodiaŭ. La paco alportis kun ĝi novajn kondiĉojn, kaj ni devas gratuli la preslaboristojn pri la akiro de pli bonaj salajroj. Sed samtempe ni povas averti ilin, ke ili mortigas "la anseron, kiu demetas la orajn ovojn." Pri kiu nia malapero estas ekzemplo.

Sed kvankam ni forpasas Esperanto ne forpasas; kaj ni ĝojas, ke ni povas porti nian entuziasmon kaj talenton en la nacian gazeton, *The British Esperantist*. Ni esperas, ke ĉiuj, kiuj subtenis nin fariĝos abonantoj de tiu gazeto, kaj helpos fortigi ĝin, kiel unu el la plej progresema Esperantistaj gazetoj en la mondo.

## Resurgam.

## Deziras korespondi.

- S-ro EDMOND PICKORZ, stud. teol.  
Schwenkfeldstr, 15, Breslau,  
Germanujo, por siaj junaj  
lernantoj (12-16 j.), ankaŭ kun  
aliaj studentoj.
- S-ro WALTER KUTZLI, Rosenheimstr,  
5 St. Gallen, Svisujo, kun  
junuloj.
- S-ro B. GLUCHOWSKI, lernejestro,  
Rakow p. Czestochowa, Pol-  
lando, por siaj junaj lernantoj  
(14-16 j.).
- S-ro ARTHUR SOHRMANN, instruisto,  
Kronprinzenstr, 5, Weinleshla,  
Dresden, Germanujo, por siaj  
lernantinoj (14 j.).
- S-ro KAREL LOVEĈEK, Pol. tr.  
7, Holešov, Moravio; Ĉeĥo-  
slovakio.
- S-ro ARMAND B. COIGNE, 2633  
Creston Avenue, E. M. Bronx,  
New York, N.Y., U.S.A., de-  
ziras koni interesatojn je inter-  
nacia asocio por psika eketado,  
kiel helpontoj kaj avizontoj.  
Korespondas pri nenia alia temo  
kaj ne respondas al p.m. kaj  
p.k. kolektantoj.

## U E A

## Universala Esperanto Asocio

Every Esperantist should become a member of the U.E.A. and subscribe to its official organ "ESPERANTO."

The Annual Subscription to the Association is 2s., and to the Gazette 5s.

*Delegates of the U.E.A. throughout the world*

Central Office

14 MUSEUMSTRASSE, BERNE, SVISUJO

## ESPERANTO

DUTTON'S Business College give both personal and postal tuition in Esperanto, the International Auxiliary Language. Correspondence Tuition enables you to study by your own fireside and at your own pace. Special Advanced Courses for B.E.A. Full certificate can be arranged. Send stamp for full details to Dutton's Business College, (Desk 60E), Skegness, and at 92 and 93 Gt. Russell Street, London, W.C., and Victoria Buildings, Manchester.

—BY POST—

The National Council meeting of the Women's International League, held in October at 14 Redford Row, London, passed the following resolution:—

"That it be a recommendation to Branches to encourage the study of Esperanto in order to facilitate international intercourse, and to urge the teaching of Esperanto in the schools."

The apparatus for learning the correlatives, printed on p. 119, has been reprinted on cards which may be had from B.E.A., 1s. 3d. per dozen, post free.

## ANGLA KAJ ESPERANTA ETIMOLOGIO

(English and Esperanto Etymology)

DE CHARLES G. STUART-MENTETH  
B.A. (Oxon.)

"Celas prui la naturecon kaj internaciecon de Esperanto kaj certe bone sukcesis."—*Esperanto* (Bahia Blanca), Oktobro.

"Bonega broŝuro."—*Le Monde Esperantiste*, Aŭg. Sept.

10 pecoj: Sm. 0.410, afrankite

B.E.A., 17 HART STREET, LONDON, W.C.1

## KVAR NOVAJ KANTOJ

*En Unu Kajero*

BELA KRISTNASKA DONACO

Ĉarmaj kaj ĝojigaj

Originalaj esperantaj vortoj de J. D. APPLEBAUM  
Angla Traduko kaj Muziko de CHS. B. MABON

Prezo 1s. 2d. (Sm. 0.500) afrankitaj ĉien ajn  
aŭ 4 respondkuponoj

Havebla ĉe B.E.A., London, aŭ ĉe Hon. Sec.  
11 Mayville Road, Mossley Hill, Liverpool

## THE BEST FOR ALL LANGUAGES

*Gregg* EASY To LEARN  
Shorthand To WRITE  
To READ

All characters light, no thickening.  
Vowels inserted in natural order. This  
makes reading as sure as longhand.

Esperanto adaptation, price 1/6  
post free 1/7½

*Particulars and Copy of Magazine free*

THE GREGG PUBLISHING COMPANY  
21 HARRINGTON STREET, LIVERPOOL

# SELECT LIST OF ESPERANTO BOOKS

OBTAINABLE FROM  
**THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorporated)**  
 17 HART STREET, LONDON, W.C.1

## FUNDAMENTA KRESTOMATIO

Edited by Dr ZAMENHOF

Prose and Verse Selections  
 The Standard Guide for Esperanto Style

460 pages

*Paper, 4s. Bound, 5s. 6d. Postage, 6d. extra*

## SOME ORIGINAL WORKS IN ESPERANTO

**MIRINDA AMO.** By H. A. LUYKEN  
 Paper, 2s. 6d. Bound, 3s. 6d.  
**NOVA SENTO.** By TAGULO 1s. 6d.  
**TRAVIVAJOJ DE RO ŜO.**  
 By RICHARD SHARPE 1s. 6d.  
**LILIO.** By E. ALLEYNE SINOTTE  
 Bound, 2s. 6d.

Postage extra

## THE ESPERANTO MANUAL

By MARGARET L. JONES

*Fifth Edition. 1s. 6d. net, 1s. 8d. post free*

## THE ESPERANTO TEACHER

By HELEN FRYER

*Ninth Edition. 1s. net, 1s. 2d. post free*

*Second Edition* **THE** *Revised*

## 'EDINBURGH' ESPERANTO POCKET DICTIONARY

206 pages. 18,000 words

"A really useful, convenient, and presentable volume."—*British Esperantist.*

*Leather, 2s. 7d. post free; Cloth, 1s. 7d. post free*

## SHAKESPEARE IN ESPERANTO

HAMLET (Dr ZAMENHOF). Paper, 2s.

MAKBETO (LAMBERT). Cloth, 2s.

LA VENTEGO (MOTTEAU). Cloth,  
 2s. 2d.

LA VENECIA KOMERCISTO  
 (WACKRILL). Paper, 1s. 6d.

## THE BIBLE IN ESPERANTO

**NEW TESTAMENT**, complete

*(Published by British & Foreign Bible Society)*  
*White Paper, Art Cloth, 2s. 3d.; French Morocco, 4s.; Persian Yapp, 10s.; India Paper, French Morocco, 5s.; Persian Yapp, 12s.; postage 3d. extra*

## OLD TESTAMENT

Dr ZAMENHOF's Translations

Genesis, Exodus, Leviticus, Numbers, Deuteronomy, 2s. each; the Psalms, 2s. 6d.; Proverbs, 1s. 6d.; Ecclesiastes, 9d.

By BERNARD LONG, B.A.

## ESPERANTO AND WHY WE NEED IT

30 pp. Price 2d.

*Two Shillings a dozen post free*

"A convincing booklet"

## INDISPENSABLE BOOKS FOR ADVANCED STUDENTS

**GRAMMAR AND COMMENTARY**

Compiled by  
 Maj.-Gen. GEORGE COX, B.A. (Cantab.)  
*Third Edition. 3s. 3d. post free*

**ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY**

By EDWARD A. MILLIDGE  
*Third Edition. 7s. 9d. post free*

**ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**

By JOSEPH RHODES, F.J.I.  
*Post free, 5s. 5d.*